Survoje al eŭropa identeco

(K.Friese / Majo 2014)

1. Enkonduto

Rigardante la nunan eŭropan balotbatalon en nia lando oni tuj ricevas la impreson ke verŝajne la plejmulto diras 'Jes' al Eŭropo kvankam, kompreneble, troviĝas ankaŭ multaj kritikaj opinioj.
Kial oni sentas sin kiel eŭropano? El kiu konsistas la eŭropa identeco? Aŭ, kiu estas la apartaĵo esti eŭropano? Eŭro kaj liberaj vojaĝeblecoj ne povas esti la solaj fundamentoj!

Spontane ni eventuale pensas al la Eŭropa Kanto-Konkurso kaj al sportaj konkursoj. Krome oni certe memoras multajn komunecojn kaŭzitaj de la historia evoluo, se tiuj estis instruitaj en la lernejoj. Sed nuntempe apenaŭ troviĝas multaj fundamentoj kiuj povus gvidi al la sento, ke ni estas eŭropaj kunuloj.

2. Proponoj

La sekvanta listo (certe ne kompleta) enhavas proponojn, kiuj laŭ mi povus gvidi al eŭropa identeco; parte jam nun sukcese uzataj.

Edukado en bazaj lernejoj:

Uzado de kolektoj de eŭropaj fabeloj, kantoj, ludoj

Lernejo/profesielernejo/universitato:

Komuna instruplano por la eŭropa historio, instruado de fremdaj lingvoj laŭbezone kaj laŭ elekto, instruado de Esperanto en tuta Eŭropo, interŝanĝ-programoj, partopreno en eŭropaj konkursoj, samaj strukturoj en kvalifikitaj kursoj, agnosko de la atestoj

Kulturo:

Eŭropa televid- kaj radio-elsendoj, eŭropaj konkursoj (ekz. kantokonkurso), ĝemelurbaj aranĝoj

Sporto:

Eŭropaj konkursoj, instalado de specialaj eŭropaj teamoj por partopreni en kontinentaj konkursoj

Ekonomio:

Adaptiĝo de impostoj kaj labor-circonstancoj, eŭropaj foiroj, eŭropa vendo-semajno

3. Rimarkoj por Esperanto

Se oni instruus Esperanton ĉie en Eŭropo en la lernejoj tiam oni jam multon gajnus por la eŭropa identeco. Esperanto estas ja relative rapide lenebla i.a. pro la reguleco de la gramatiko, tial la realigo nur bezonus malgrandajn kostojn kaj klopodojn. Krome la traktado pri Esperanto plibonigus la ellernon de aliaj fremdaj lingvoj. Aldone estas nescese ankaŭ konsideri multajn lingvojn de la migrantoj, kvankam tiuj lingvoj komence ne estis eŭropaj.

Ĉiukaze Esperanto disponigus neŭtralan internacian komunikeblecon. Tio estas efektiva rimedo kontraŭ la hegemonioj de la 'grandaj' lingvoj.

Eventuale oni preferos novan, reviziitan Esperanto-version speciale por la uzo en Eŭropo. Ankaŭ estus pensebla krei tute alian eŭropan planlingvon. Tiun oni certe devus evoluigi kaj elprovi (kontraste al Esperanto).

Tia tute eŭropa projekto donus grandan kontribuon por la trovado de la identeco. Tiam ĉiuj eŭropanoj vere havus komunan, neŭtralan bazon por komunikado. La uzado de tia komuna eŭropa lingvo kompreneble ne kontraŭus ke ankaŭ aliaj landoj povas uzi ĝin, kiel la nuna situacio rilate al Esperanto ja bone montras.

4. Konkludoj

La plua sekurigado de la demokratio, libereco kaj paco bezonas la kunlaboron de ĉiuj eŭropaj popoloj. Se ĉiu eŭropano identigas sin kun sia Eŭropo oni estas sur bona vojo atingi veran eŭropan komunumon. Por tio Esperanto povas doni valoran kontribuon.

Klaus Friese

Hamburgo, 12-a majo 2014